FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- N° 38 - - Décembre 1956 -

Redaktas S-ro M. HUET, 1 Allée Pigny, LE HAVRE (Seine-Maritime)

## * Nia Vivo *

VEKIĜO DE SUDA PARTO DE NORMANDUJO

Nia normanda movado prosperas. Tamen, ĝis nun, la plej vigla parto situis en la departementoj Seine-Maritime kaj Eure, malgraù klopodoj de agemaj amikoj en Calvados kaj Orne.

Nia kunlaboranto Duthilleul, vicprezidanto de U. N. E., kuraĝe konsentis restarigi grupon en Caen kaj, ankaù, nian 26-an regionan kongreson. La 2-an de Decembro, li alvokis la bonvolulojn al kunsido, kiun prezidis S-ro Bosc, kaj oni povas konkludi ke Sud-Normandujo prenos mane la normandan flagon.

Kompreneble, nia amiko renkontos la kutimajn barojn kiuj provos bremsi lian fervoron. Per nia helpo, li nepre devos sukcesi kaj ni petas ke vi tuj aliĝu al la Caen-Kongreso kiu okazos la 5-an de Majo 1957.

KONGRESKOMITATO: Prez. Advokato DUTHILLEUL, 35 r. de Bayeux; Sekr. F-ro MICARD 12 Rue d'Hastings; Kasistino: S-ino DUTHILLEUL.

KOTIZO: 100 Fr - Poŝtĉekkonto ROUEN 12337, Mme DUTHILLEUL 35 rue de Bayeux-CAEN.

T U J   A L I Ĝ U !

LE HAVRE = Tri elementaj kursoj funkcias kun 15 gelernantoj (por geinstruistoj kaj publika, de la neùtrala grupo; publika de la laborista grupo). Kvin gelernantoj partoprenas la duagradan kurson.

- La decido de la urba konsilantaro, donanta la nomon ZAMENHOF al unu el la stratoj de nia urbo, estas nun aprobita de la Prefekto de Seine-Maritime.

- Niaj gesamideanoj LETENDRE, kiuj loĝas nun en Saint-Laurent-de-Brèvedent , sciigis al ni la naskiĝon de sia ido Albin. Niajn gratulojn!

EVREUX = Propagando daùras kaj kurso pretigas.

SOTTEVILLE-lès-ROUEN = Kurso de Samideano Quillau en Société d'Etudes diverses.


FECAMP = La kursoj bone funkcias kun 28 gelernantoj, nome: 1-a grada kurso: 15, 2-a grada kurso: 10, supera: 3.

- Okaze de Epifanio, kiel kutime, la grupo festos la tri reĝojn per familia festeno, je la komenco de januaro.

- La grupo vigle propagandas ĉe la instruistaro. Jam, inter la gelernantoj, troviĝas tri profesoroj kaj iu filo de publika lerneja direktoro.

CAEN = La grupo restariĝas. Kurso de Fraùlino Micard.

YVETOT = Senlaca propagando, precipe sur ĵurnaloj, farata de Fraùlino Fercoq.




Rue Docteur ZAMENHOF estas taŭga propagando tial ĝi kaptas la atenton de la preterpasantoj kaj, samtempe, montras al la urbestraroj la viglecon de nia movado.

ĈU VI JAM PETIS "RUE ZAMENHOF" DE VIA URBESTRO ?

★ ★ ★ ★ ★

KOTIZOJ POR 1957

U.N.E. + Normanda Bulteno: 100 Fr.
UNION ESPERANTISTE NORMANDIE, 32 r.du Cours, SOTTEVILLE-lès-ROUEN - CCP:ROUEN 28340
ATENTU ! Nur la Membroj pagintaj la kotizon ricevos la Bultenon!

U. E. F. - 1) Simpla Membro k "Franca Esperantisto": 550 Fr; 2) UEA Membro Jarlibro (MJ): 1.050 Fr; 3) MJ + revuo "Esperanto" (MA): 1.550 Fr; 5) UEA Membro subtenanto (MS): 2.050 Fr.
UNION ESPERANTISTE FRANCAISE, 34 Rue de Chabrol, PARIS 10° - CCP: PARIS 855-35.

G. E. E. - Kotizo kaj revuo "Esperanto et culture" : 500 Fr
Subtena kotizo : 600 Fr
Pagu al S-ro BIDOIT, 6 Rue de la Paix, BAUGE (M. & L.) - CCP: NANTES 143-867.

S. A. T. - Sennaciulo .......... 600 Fr
Sennaciulo revuo .... 780 Fr
Novaliĝanto pagu krome 40 Fr.
S.A.T. AMIKARO, 67 Avenue Gambetta, PARIS 20°.

UNIVERSALA LIGO.- Abono al "La PRAKTIKO" ........ 600 Fr
Pagu al S-ro LABIT, 120 bis rue Meurein, LILLE (Nord) - CCP: LILLE 1.709-29


★ ★ ★ ★ ★

N I   D E Z I R A S   A L   V I . . .

*Bonan Jaron...*

KAJ SUKCESON AL NIA MOVADO !

P O R   Ĉ I U J   F R U K T O D O N A N   P A C O N !



★ ★ ★ ★ ★

N.D.L.R.- Por ke la proksima numero de la Bulteno estu presita antaŭ la fino d monato Marto, bonvolu sendi al mi la artikolojn antaŭ la 20-a de Marto. Anta